

ROK XXIV.

STYCZEŃ 1930.

JARO XXIV.


JANUARO 1930.



N-r 1.

N-o 1.

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Plej bela ĝardeno en Warszawa estas parko Łazienki (elp. ŭazjenki). Ĝian brilan ornamon nome: reĝan palacon kun kolektaĵoj de belartoj prezentas la bildo.

ESPERANTYSTA POLSKI

POLA ESPERANTISTO

**WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW**

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

Leo Turno: Kompletny Podręcznik estas sendata ĉiam tuj, en la sama tago, en kiu venas la mendo. Bonvolu noti la opajn prezojn (poŝtpago enkalkulita) (1 ekz. 1,25 zł):

5 ekz. — zł 5.—		10 ekz. — zł 9.50
20 " — " 18.50		30 " — " 27.—
50 " — " 45.—		100 " — " 85.—

Leo Turno: Wyższy Kurs języka Esperanto estas vendata (poŝtpago enkalkulita) (1 ekz. 2.— zł):

5 ekz. — zł 7.50 (anst. 10.— + poŝtp.)
20 " — " 28.— (" 40.— " ")
50 " — " 70.— (" 100.— " ")

Pagu al PKO No 405.716, Kraków, aŭ al Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

TREŚĆ — ENHAVO:

JAN KOSTECKI: ESPERANTO A SEKCIARZE. RED.: NA CZASIE. WŁADYSŁAW RYMKIEWICZ: PENSULO. BOL. PRUS: MIHAŁKO (TRAD. H. HEMPEL). JAN ZAWADA: ĈU LA VORTFORMOJ „ALIO, ALIES, ALIAM” KTP. ESTAS ALLASEBLAJ? ALVOKO PRI VIENA DEFICITO. POLLANDA KRONIKO. BULTENO DE U. E. A. DE LA REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIV JARO

KRAKÓW
STYCZEŃ 1930 JANUARO

Nr 1 N-o

ESPERANTO A SEKCIARZE.

W miesięczniku „Pod znakiem Marji” alumn seminarjum z Pelplina, A. Troszyński, pisze o Esperancie tak:

„Czy my katolicy możemy obojętnie patrzeć na ten ruch światowy, czyż nie przeraża nas fakt, że dotychczasowa akcja esperancka spoczywa głównie w ręku sekciarzy, masonów i komunistów? Czyż nie ogarnia nas rumieniec wstydu na myśl, że jedyny polski miesięcznik esperancki, wychodzący w Krakowie, redagowany jest przez żydów, że nawet Marjawiści wydają w esperancie swoje czasopismo propagandowe? Poznali już doniosłość esperanta wrogowie katolicyzmu i używają go dla swych niecznych, antyreligijnych celów”.

Znając oddawna ruch esperancki, mogę zapewnić autora powyższych uwag, że nie spoczywa on „głównie w ręku sekciarzy, masonów i komunistów”. Ruch esperancki spoczywał od początku i spoczywa do dzisiaj przeważnie w ręku idealistów, którzy pragną zapomocą wspólnej pomocniczej mowy zbliżyć zwaśnione ludy świata i szowinizmowi przeciwstawić miłość człowieka, miłość bliźniego. Tak rozumiał ideę naszą jej twórca, doktor Zamenhof, tak rozumiał ją Antoni Grabowski i rozumieją zagranicą ci, których głos w szeregach naszych najwięcej dzisiaj waży. Kto raz choćby wziął udział w międzynarodowym kongresie esperanckim, ten wie, że taka właśnie, nie inna, jest jego atmosfera.

Oficjalny zaś ruch esperancki wyraźnie oświadcza, że jest neutralnym, że obcą jest mu propaganda jakichkolwiek haseł politycznych lub religijnych. Ostatnio jeszcze, parę miesięcy temu, powziął w tym sensie niedwuznaczną uchwałę Międzynarodowy Centralny Komitet Esperancki.

Esperanto nie ma więc swego politycznego czy religijnego programu. Ma tylko swoją tendencję, tendencję humanitarną, która napewno w najmniejszej nawet nie stoi sprzeczności z ideałem, jaki szerzą kościoły chrześcijańskie.

Z drugiej strony Esperanto, jako techniczny środek porozumiewawczy, dostępne jest dla każdego i każdy korzystać zeń może

dla własnych swych celów. Faktem jest, że korzystają zeń dzisiaj i komuniści i sekciarze, nawet japońscy i hinduscy. Ale korzystają zeń także i katolicy, i skauci, i związki zawodowe, i patryjoci różnych krajów. Specjalnie często używał go i używa patryjotyzm polski dla zaznajamiania świata z polską myślą i kulturą, zarówno w czasach niewoli, jak obecnie. Nie powinni o tem zapominać zwłaszcza sami Polacy, kiedy wydają sądy o sprawie esperanckiej.

Zrozumiałą jest rzeczą, że pragnęlibyśmy wszyscy, by Esperanto służyło tylko szlachetnym ideom i zamierzeniom. Ponieważ jednak praktycznie osiągnąć tego niepodobna, pozostaje nam w ręku jeden tylko środek: zaprząć je do służby tym ideałom, które za dobre uważamy, by w ten sposób zrównoważyć i przewyższyć szkodliwe działanie innych. Ta droga dla wszystkich jest ciągle otwarta, i z radością powitamy każdy nowy w tym kierunku wysiłek.

Nie bądźmy też zbyt wielkimi pesymistami! Bo naprawdę jest w Esperancie jakieś „imponderabile“, jakiś element trudny do obliczenia, który w rezultacie każdej walki ideowej, na jego terenie stoczonej, daje plus moralny. To jest ta tendencja, o której wyżej wspomniałem, ta Idea Wewnętrzna Esperanta, która powoli działa, jak dobroczynne promieniowanie. Starzy Esperantyści rozumieją napewno, o czem tu mówię.

Nieprawdą jest, że „jedyne polski miesięcznik esperancki, wychodzący w Krakowie, redagowany jest przez żydów“. Prawdą natomiast jest, że współpracują w nim zgodnie i w największej harmonii Polacy i Żydzi. Dalecy jesteśmy od tego, aby ten fakt wywoływał na nasze lica rumieniec wstydu. Przeciwnie, jesteśmy z tego dumni. Jesteśmy dumni, że na „Polskim Esperantyście“ sprawdza się marzenie Mickiewicza o Jankielu, Orzeszkowej o Meirze i sprawdza także historia Berka Joselewicza. Bo „Esperantysta“ prócz roboty esperanckiej, robi też i robił zawsze robotę ściśle polską. A jeżeli nasi Żydzi biorą w niej udział, to jest to chyba dowodem, że na nasze polskie ideały patrzą z sympatją i szacunkiem. Dokonała tego współpraca na niwie esperanckiej. Współpraca w myśl hasła: „homo homini frater“, będącego także jednym z najistotniejszych haseł chrystjanizmu.

Zapomocą Esperanta można zrobić dla Polski bardzo, bardzo wiele. Winni się do tego zabrać wszyscy, którym to leży na sercu.

Ale przystępując do pracy w środowisku różnonarodowych i równoprawnych partnerów, niechże się choć trochę do tego środowiska przystosują!

Jest to **niezbędny** warunek powodzenia.

Jan Kostecki.

NA CZASIE.

Otrzymał list, który podajemy w polskim tłumaczeniu, by zachować jednolitość języka z artykułem poprzednim.

„.....! Pozwalam sobie przesłać tekst kartki pocztowej, którą otrzymało nasze towarzystwo od radcy szkolnego p. Dra Knopfa z Bytomia G. Śl.:

„Szanowni Wspólidealowcy! Z wielką przyjemnością otrzymałem Waszą miłą kartkę z 12. IX. i serdecznie za nią dziękuję. Na fotografii znalazłem kilka znanych twarzy. Zapewne ta wycieczka dobrze się udała. Tego samego dnia bytomscy i krakowscy pacyfiści byli na Klimczoku. Już poprzedniego dnia pojecha-

łem i spędziłem bardzo miły wieczór w Bielsku. Niestety krakowscy przyjaciele jeszcze dotąd nie są esperantystami. Zdaje się, że katolicy w Polsce w przeważnej części uważają Esp. jako sprawę czysto żydowską. Szkoda! Spodzielając się, że się wkrótce ujrzemy, łączę serdeczne pozdrowienia dla wszystkich — Wasz oddany W. Knopf".

Naprawdę wielka szkoda, że zagraniczni współideowcy czynią nam takie nieprzyjemne uwagi o naszym ruchu. Może się okoliczności wkrótce zmienia. Z poważaniem J. Tichawski".

Do listu tego nic nie dodajemy, uważając, że artykuł wstępny sprawę dostatecznie oświetla. Red.

PENSULO.

Li sidis sur la bordo de rivero kaj meditis.

Antaŭ li etendis sin senlima vastajo da kampoj kaj herbejoj, super li lazura, sennuba ĉiela arkajo.

La kvietia rivero fluis sub liaj piedoj trankvile, malrapide kaj majeste, agordante lian animon al enpeniĝo pri celo de vivo de l' homc, kies pensoj, revoj kaj aspiroj flugas senhalte, senbride simile al ondoj svarmantaj kaj fluantaj en malproksiman, netravidoblan forajon.

Li subaŭskultis la sturmojn de l' ondoj kaj kvazaŭ aŭdis en ili mallaŭtan plendon de homaj suferoj, eterne vivaj kaj neniam kvietigeblaj.

Kaj rigardante la fluon de l' akvo li eksentis ian senliman bedaŭron al homaro dediĉita al doloroj sur la tero.

Ĉu venos iam la tempo — li pensis — kiam la doloroj de l' homoj ĉesos ekzisti? Ĉu estas plenumeble kvietigi aŭ almenaŭ mildigi ilin?

Sub la pezo de funebraj pensoj li mallevis la kapon kaj akra bedaŭro ŝiris lian koron kvazaŭ per feraj ungoj kaj al la okuloj premiĝis larmoj, maldolĉaj larmoj pro la doloro homa.

La aero estis saturita de odoro de trifolioj kaj kampaj floroj, la tuta naturo kvazaŭ ĝojis kaj ridetis, la suno semis ĉirkaŭe per siaj lumaj radioj feliĉon kaj ĝojon de l' vivo, de malproksime aŭdiĝis surdigita gaja ĉirpado de alaŭdoj, eĉ la blcveto ŝajnis flustri en la orelojn misterajn vortojn de gajeco, tamen li ne turnis atenton sur la ĉarmon de l' naturo, ne vidis helajn radiojn de ĝoj' kaj vivportanta suno, ne aŭdis sorĉan tinton de l' birdaro, ne pensis pri nekomprenebla parcelo de venteto, ĉar sur lia animo sidiĝis ĉagreno pro malfeliĉeto de l' homaro, ĉar en lia koro regis akra funebro de pereigita feliĉo de homa gento pro peko de la unuaj gepatroj.

Kaj jen la homoj kun malkonfido rilatas unu al la alia, malamo, envio kaj severa, senkompata egoismo superregas noblajn ideojn de abnegaciemaj homoj celantaj la promesitan de profetoj kaj regantan en profundo de l' homa koro fratecon de popoloj.

Multaj, multaj similaj al li homoj sopiras al eterna paco, al venko de la vero kaj lumo super la mensogoj kaj rutinaj superstiĉoj ŝirmantaj la mondon kaj barantaj la vojon al tera paradizo.

Multaj noble pensantaj ideanoj revas pri edifado de homa naturo inklina pli al malbono ol bono, serĉante efikajn rimedojn por ekstermo de spirita inercio, kiu malebligas al la homo ekscii la efektivan veron kaj diferencigi ĝin de maskitaj malnoblaj hipokrizajoj.

Multaj oferemaj abnegaciuloj celas ŝanĝiĝon de malnobla sklavara reĝimo reganta la teron kaj kaŭzanta ĉie malfeliĉon, mizeron kaj plendojn.

Multaj impresiĝemaj koroj doloras pro maljusteco, kiu ĝis nun daŭrigas sian regnecon.

Kaj meditante pri tio ĉi kun mallevita kapo li sidis malĝoja kaj ĉenpensinta.

La suno atingis jam sian zeniton sur la ĉielo kaj la pensulo ĉiam ankoraŭ rigardis la kvietan riveron kaj kvazaŭ sub influo de dormigaj malluĝaj sturmoj de la ondoj fluantaj senĉese, senfine lia animo paciĝis kaj skuinte maldolĉajn pensojn alpremantajn obstine al kapo li ekrigardis per subite eklarmiĝintaj okuloj la lazuran ĉielon kvazaŭ tie serĉante konsolon de turmentiĝo de l' animo plena je l' kompatato por suferanta homaro.

En lazuro de ĉiela arkajo kuŝis ia mira sorĉo, sub kies influo iom post iom kvietiĝadis la koro de tiu ĉi pensulo, mokata de aliaj homoj kunfratoj kaj suferanta pro tio multe pli multe.

Kaj kvazaŭ somnambulo subite vekita el dormo per mistera forto de klara lumo de la luno li rigardis sencecie per la lacaj okuloj la lazuran ĉielon sentante por momento kvietiĝon de l' animo kaj liaj pupiloj ripozis sur la suno kaj ŝajnis al li, ke en ĝi li trovis antaŭdiron de plenumo de la noblaj aspiroj, kiujn celas la homoj de bona volo dissemante la grajnoj de bono kaj belo tra la landoj de la tero kaj profetante al ĝi naskiĝon de la frateco de popoloj en proksima baldaŭ venonta tempo.

Władysław Rymkiewicz.

BOLESŁAW PRUS (Aleksander Głowacki).

MIĤALKO*).

(fina parto).

Miĥalko, malriĉa vilaĝano, kiu venis Varsovion por gajni monrimedojn, staris antaŭ la pordego de unu el urbaj domoj, konsiderante, kien li devas sin direkti, por trovi laboron. Tiam li ekrimarkis, ke sur la nepavimita strato, kie staris apenaŭ kelkaj domoj, svarmas teruritaj homoj. Ili kriis kaj montris per manoj la nefinitan konstruaĵon, antaŭ kiu kuŝis tabuloj, rompitaĵoj kaj tute novaj ruboj. Super ĉio leviĝadis ruĝa polvo el briko.

Miĥalko alkuris pli proksimen. Tie li jam ekvidis kio okazis. Jen -- estis falinta nova domo.

Unu flanko tute dispeciĝis de supre ĝis tero, kaj la dua en pli granda parto.

En la breĉitaj muroj pendis fenestraj kadroj kaj du traboj, destinitaj por surportado de plafonoj, malsuprenfalis, fleksiĝis kaj frakasiĝis kvazaŭ splitoj. En la fenestroj de najbaraj domoj aperis ektimigitaj virinoj. Sed sur la strato, krom la laboristoj, trovis sin apenaŭ kelkaj personoj. La famo pri la akcidento ne havis ankoraŭ tempon por atingi la urbmezon.

*) Popola formo de l' nomo Miĥaelo. (Rim. de l' tradukinto).

La unua konsciiĝis ĉefa majstro.

— Ĉu neniu pereis? — li demandis tremante.

— Sajnas ke ne. Ĉiuj ĉeestis dum la matenmanĝo.

La majstro komencis kalkuli siajn laboristojn, sed senĉese eraris.

— Ĉu alestas la laborkunuloj?

— Ni estas!

— Kaj la helpantoj?

— Ni estas!

— Andreo malestas — aŭdiĝis unu voĉo.

— Jes, li trovis sin interne.

— Oni devas lin serĉi — diris la majstro per raŭka voĉo.

Kaj li iris al la renversita domo kaj post lin kelkaj pli kuraĝaj. Miĥalko senpripense ankaŭ proksimiĝis.

— Andreo!... Andreo! — vokis la majstro.

— Vi foriĝu de tie! — oni lin avertis. — Tiu muro apenaŭ pendas.

— Andreo!... Andreo!...

El doma interno respondis ĝemo.

Unuloke la muro estis disŝirita je larĝeco de pordó. La majstro ĉirkaŭkuris de alia flanko, enrigardis kaj kaptis ambaŭmane sian kapon. Poste, kiel freneza, rapidiĝis en urbon.

Post la muro, la homo tordiĝis pro doloro. La trabo frakasis kaj surprimis liajn ambaŭ piedojn. Super li pendis mura abruptaĵo, kiu krevis pli kaj pli forte kaj povis ĉiumomente forŝiriĝi.

Unu el ĉarpentistoj komencis observi la detalojn de l' loko kaj la laboristoj ŝtoniĝintaj pro timo, fiksis rigardon en liajn okulojn, pretaj iri, se la savo estas povebla.

La vundito konvulsie turniĝis kaj apogis sin sur du manojn. Li estis vilaĝano. Li havis buŝon nigran pro turmento, grizan vizaĝon kaj kavigitajn okulojn. Rigardante la homojn, kiuj staris apude, je dekelkaj paŝoj, li ĝemis, sed ne kuraĝis alvoki helpojn — nur ripetis:

— Dio mia!... Dio mizerikorda!...

— Ĉi-tien oni ne povas eniri! — diris surdvoĉe la ĉarpentisto.

La homa grupo iĝis malantaŭen.

Inter la aliaj staris Miĥalko, konsternita eble pli forte ol ili.

Terura estis kion li spertis!... Sentante tutan doloron de l' vundito, lian timon, malesperon, li sentis samtempe ian forton, kiu lin puŝis antaŭen...

Sajnis al li, ke en tiu homamaso, neniuj, nur li sola havas devon kaj — devas nepre helpi la homon, kiu venis tien el kamparo, serĉante vivrimedon. Kaj en sama momento, kiam la aliaj interdiradis: „Mi iros!“ li pensis:

— Mi ne iros! Mi ne volas!

Li ĉirkaŭrigardis timeme, starante izolita antaŭ la aro, pli proksime de l' muro, ol la ceteraj.

— Mi ne iros!... li flustris kaj — levis la stangon, kiu kuŝis preskaŭ ĉe liaj piedoj.

Inter la homoj aŭdiĝis murmuro:

— Rigardu!... Kion li faras?...

— Silentu!

— Dio mizerikorda, vi kompatu! — vokis la kripligito, plorigante pro doloro.

— Mi iras! iras!... — diris Miĥalko kaj — eniris inter la rubojn.

— Vi ambaŭ pereos! — ekkriis la ĉarpentisto.

Miĥalko jam estis apud la malfeliĉulo. Li ekvidis liajn rompitajn piedojn, sangan marĉeton kaj mallumiĝis en liaj okuloj.

— Frato mia! frato!... — flustris la vundito kaj ĉirkaŭbrakis liajn genuojn.

La vilaĝano ekŝovis la stangon sub trabon kaj per malespera movo, sublevis ĝin. Etendiĝis la krakbruo kaj el la duetaĝa alteco, falis kelkaj brikpecoj.

— Ruliĝas!... — ekkriis la laboristoj kaj diskuris.

Sed Miĥalko nenion aŭdis, nenion konsideris, nenion sentis. Per forta brako li denove subpuŝis stangon kaj tiufoje tute forŝovis la trabon de la dispremitaj piedoj de l' kuŝanta homo.

El supro ekŝutiĝis gruzoj. Ruĝa polvo leviĝis volve, densiĝis kaj pleniĝis la internon de l' konstruaĵo. Post la muro estis aŭdebla ia baraktado. La vundito ekĝemis pli forte kaj subite mallaŭtiĝis.

En la malfermaĵo de l' disŝirita muro, aperis Miĥalko kurbiĝinta, portanta kun peno la kriplulon. Li pasis malrapide la danĝeran limon kaj, stariĝinte antaŭ la homamaso, li ekkriis kun naiva ĝojo:

— Li veturas!... veturas!... nur unu el liaj botoj tie restis.

La laboristoj kaptis la vunditon, kiu estis sveninta kaj portis lin singarde al plej proksima pordego.

— Donu akvon!... — ili vokis.

— Vinagron!...

— Alvenigu doktoron!...

Miĥalko malvigle sekvis ilin, konsiderante:

— Jen bona nacio en tiu Varsovio! Mi ne timu!

Li rimarkis, ke liaj manoj estas sangmakulitaj, do lavis ilin en strata akvomarĉeto kaj stariĝis apud la dompordego, kie kuŝis la vundito. Internen li ne enpuŝis sin. Ĉu li ja estas doktoro? Ĉu li scipovas ion konsili?

Dume komenciĝis la strato pleniĝi per homoj. Kuris scivoluloj, rapide veturis fiakroj kaj eĉ de malproksime oni povis aŭdi la sonorojn de l' fajra gardistaro, kiun ankaŭ iu ekalarmis.

Nun, nova aro da impresavidaj homoj amasiĝis antaŭ la pordego kaj la pli malkvietemaj malfermis al si vojon per pugnoj por ekvidi la sangan spektaklon.

Al unu el ili, Miĥalko, staranta ĉe flanko pordeto, baris la trairon.

— Iru for, gapulo mizera! — ekkriis tiu sinjoro, vidante, ke la vilaĝano nesufiĉe rapide cedas al la ekpremo de lia mano.

— Pro kio ja? — demandis Miĥalko mirigita pro tiu impeto.

— Kiu ci ja estas, arogantulo ia! — ekkriis la scivolemulo. — Kiel do, ĉu ne estas tie policanaro, por dispeli tiajn mallaboremulojn?

— Ho, tio komenciĝas malbone! — pripensis la vilaĝano kaj ektimiĝis supozante, ke pro tiu kulpo oni povas lin fermi en areston.

Kaj ne volante altiri sur sin ian malbonaĵon, li enpremiĝis en la homamason.

P O L A E S P E R A N T I S T O

JARKOLEKTO XXIII. * 1929.

ROCZNIK XXIII. * 1929.

E S P E R A N T Y S T A P O L S K I

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR — REDAKTANDO:
PROF. DR. ODO BUJWID

WSPÓŁPRACOWNICY — KUNLABORINTOJ:

Alf (Kraków). — Leo Belmont (Warszawa). — Dr. M. Blassberg (Kraków). — Ludwik Brodzicki (Kraków). — Dr. A. Czubyński (Garwolin). — M. K. Dąbrowski (Kraków). — I. Dratwer (Warszawa). — Dr. L. Dreher (Kraków). Prof. B. Dyboski (Lwów). — Dr. I. Fels (Lwów). — Leonja Fruchtówna (Jarosław). — Dr. A. Gadomski (Kraków). — Józef Garbacik (Kraków). — S. J. Grenkamp-Kornfeld (Paryż). — Tadeusz Hodakowski (Kraków). — A. Hoszowski (Bolechów). — Józef Janoschka (Katowice). — St. Karolczyk (Warszawa). — Jan Kostecki (Warszawa). — L. Kronenberg (Warszawa). — Br. Kuhl (Kraków). — Ludwik Kutscher, administranto (Kraków). — I. Lejzerowicz (Łódź). — Dr. J. Mędrkiewicz (Łódź). — Zygmunt Orłoś. — Dyr. J. Orzech (Tarnów). — Fr. A. Prengel (Bydgoszcz). — Dr. L. Rosenstock (Kraków). — Dr. W. Róbin (Warszawa). — W. Rymkiewicz (Dąbr. Górn.). — E. Rytenberg (Warszawa). — Sław. (Kraków). — Prof. Miecz. Sygnarski (Bydgoszcz). — J. Szapiro (Białystok). — Józef Toczyski (Kraków). — Bronisław Tuszkiewicz (Kraków). — Anna Weinsteinowa (Warszawa). — Halina Weinsteinówna (Warszawa). — Hieronim Wierzchowski (Lwów). — X. (Warszawa). Feliks Zamenhof (Warszawa). — Lidja Zamenhof (Warszawa).

PRZEDSTAWICIELE — REPRESENTANTOJ:

Białystok — Esperanta Societo Zamenhofs, Kupiecka 49.

Katowice — Societo de Esperanto Amikoj, Wawelska 3.

Paryż — S. Grenkamp, rue de Vaugirard 4.

Warszawa — Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.



ENHAVO DE LA JARKOLEKTO 1929.

1. Artikoloj originalaj:	Paĝoj
Dro Jan Mędrkiewicz — Pollando kaj Esperanto	1
Theta — 75-jara jubileo de petrolea lampo	4
Odo Bujwid — Esperanto en Brazilio	9
I. Lejzerowicz — Citadelo de Esperanto	12
Tradukaj konkursoj 13, 52, 78, 123, 140, 165	
M. K. Dąbrowski — Hallo! Hallo! Gdzie Polskie Radio	17
Dr. Adam Gadowski — La polaj malkovrintoj kaj vojaĝintoj 20,	31
Jan Kostecki — Zamenhof vivanta	23
Jan Kostecki — Antoni Lange	29
Fez. — El mia verda paperujo	34
Jan Kostecki — Sinjoro U. E. A.	35
Sław. — Maszyna czy człowiek	41
Sob. — Pollanda Ekspozicio en Poznań	43
Jan Kostecki — La senheredigito de Helsinki	44
Br. Kuhl — Forĝejo	46
Felikso Zamenhof — Miaj rememoroj	47
Alf. — P. W. K. a Esperanto	53
Jan Kostecki — Tipo kontraŭsata	59
O. Bujwid — Progreso de Esperanto en Brazilo	65
Theta — Urbo Poznań en antaŭ-dispartiga Polujo	68
Alfa — Jan Pudel	77
Dro Stanisław Wachowiak — Pollanda Ekspozicio Ĝenerala	81
O. Bujwid — P. E. Ĝ. kaj Pollanda Konferenco Esp-a en Poznań	84
I. Dratwer — Pensoj pri la Ekspozicio	86
I. Lejzerowicz — La Ĝenerala Landekspozicio	87
Dr. L. Dreher — Impresoj el Poznań'a Kongreso de Esperanto	88
J. Szapiro — Dek jaroj da ŝtata vivo de Polujo	89
Fez. — Miss Esperanto	94
O. Bujwid — La Budapesta Kongreso Internacia	97
Dr. Antoni Czubryński — La konkludoj el statistiko	102
Halina Weinsteinówna — Ĉe - kurso en Budapeŝt	105
Józef Garbacik — „Paĉjo Bem”	108
O. B. — El la gazetaro	110
Józef Toczyski — Supernaciismo de Heroldo	111
Lidja Zamenhof — Birdo en kaĝo	113
Fez. — Terura kvaronhoreto sur la okcidento — (Nenio nova)	115
W. Rymkiewicz — Mi vidis ŝin...	117
Grenkamp-Kornfeld — Sonas serpoj, lumas suno...	118
X. — Duontagon al Dömsöd	120
Halina Weinsteinówna — Kial vi estas jam for...!	122

	Paĝoj
Prof. Sygnarski — La odoro de l' morto	123
O. B. — 350-jara jubilea festo de la Universitato de Stefano Ba- tory en Wilno	130
Mieczysław Dąbrowski — Jacek Malczewski	132
Joseph Janoschka — Wulfilas - Dro Luther - Dro Zamenhof	135
Feliks Zamenhof — Rigardo kiun mi ne povas forgesi	135
Lidja Zamenhof — Ĉe la Tombo de la Nekonata Soldato	136
Leo Belmont — Rememoro funebra pri prof. Jan Baudouin de Courtenay	141
Zygmunt Orłoś — Ĉe la tombo	146
J. L. — Impresoj de ekskurso al Gdynia	147
Leonja Fruchtówna — Aŭtuno	149
Feliks Zamenhof — Faru ĉiu la sian...	149
Tadeusz Hodakowski — Wznieśmy Dom Zamenhofa w War- szawie	155
Dr. Antoni Czubryński — Etikaj ideoj de Zamenhof	156
I. Lejzerowicz — Profeto en sia urbeto	160
L. Kronenberg — Insigno de l' Kristo	162
Uzupelnienie słownika polsko-esper. Grabowskiego — w n-rze 1, 2, 3, 10, 11, 12.	

2. Tradukoj:

Jah-Śmiechowski — La vivo (trad. Tad. Hodakowski)	6
Janusz Korczak — Birdisto, novelo (trad. Anna Weinsztein)	7
L. Rygier — Kantoj de l' nokto (trad. Eug. Rytenberg)	22
Adam Grzymała Siedlecki — Vera historio de Don Juan (trad. Br. Kuhl) en Nr-oj 2, 3, 4, 5.	
Jan Kasprowicz — Mi malamas... (trad. Br. Kuhl)	46
Antoni Lange — Vespere (trad. St. Karolczyk)	58
Janusz Korczak — Sen titolo (trad. Anna Weinsztein)	73
J. Tuwim — Interparolo (trad. Eug. Rytenberg)	116
Tommy — Jurnalno de antaŭ 200.000 jaroj (trad. T. Hodakowski)	119
L. L. Zamenhof — O serce me... (Ho mia kor'...) trad. Leonja Fruchtówna	148

3. Bibliografio: 27, 126, 151, 165.

4. Esperantista kroniko kaj movado: 8, 9, 10, 13, 14, 24, 36, 37, 49, 50,
60, 61, 62, 65, 76, 77, 124, 138, 139, 151, 163, 164.

5. Komunikajoj kaj regularo de P. E. D.: 16, 50, 54, 66.

6. Komunikajoj de U. E. A.: 11, 27, 40, 51, 63, 80, 126, 140, 153, 166.

7. Kongresoj, kunvenoj, konferencoj, ekspozicioj: 54, 56, 66, 72, 84,
95, 96, 97, 101, 134, 149.

8. Respondoj de la Redakcio; Administraciaj sciigoj; Alvokoj; Nekro-
logoj ktp.: 16, 28, 40, 49, 57, 64, 78, 80, 95, 96, 122, 125, 127,
128, 129, 135, 139, 154, 161, 163, 166.

Post kelkaj minutoj, oni komencis voki el la pordego, tiun, kiu forportis la malfeliĉulon el inter la ruboj.

Neniu respondis.

— Kiel li aspektas? — oni demandis.

— Tio estis kampulo. Li surhavis blankan drapsurtuton, rondan ĉapon kaj estis nudpieda.

— Ĉu tia ne estas sur la strato?

Oni komencis serĉi.

— Tia estis ĉi-tie — diris iu — sed estas foririnta.

Diskuris la policanoj, diskuris la laboristoj, kaj — ne trovis Mi-
halkon.

Trad. H. Hempel.

ĈU LA VORTFORMOJ „ALIO, ALIES, ALIAM“ ktp. ESTAS ALLASEBLAJ?

En la pollanda esperantista tendaro aperis lastatempe du „herzajoj: 1) En la „Plena esperanto-pola Fundamenta Vortaro“, eldonita de la „Laborista Esper. Societo-Laboro“ en Varsovio kaj prilaborita de la subskribinto — estas aldonata al la „Oficiala Tabelo de Pronomoj kaj Adverboj“ nova kolono kun la formoj: aliu, -a, -o, -es, -am, -el, -e, -om. Ĉe la formo „alia“ troviĝas steleto kun la piednoto, ke la ceteraj formoj estas neoficialaj, formataj „per analogiam“ — fenomeno — tre ofte okazanta en multaj aliaj naciaj lingvoj. — 2) En la preskaŭ samtempe eldonita kursa Lernolibro de S-ro Jan Tichawski de Katowice sub la titolo „La Mondlingvo“ — tiu sama oficiala Tabelo estas pliriĉigata per nova kolono — la direktivaj vortformoj: ien, kien, tien, ĉien ktp. — sen ia piednoto.

La recenzinto de la unue citita libro en la Novembra N-ro de „Pola Esperantisto“ diras, ke la formoj „aliu, aliam“ ktp. estas „neatenditaj“, „preskaŭ nenie uzataj“ — sed fine li ne atakas ilin kiel malĝustaj.

La recenzinto de la dua libro — nenion pri la novaĵo mencias — do ŝajne ĝin akceptas — laŭ la latina proverbo: qui tacet — konsentire videtur („silentanto — videble konsentas“).

Sed flanke de multaj amikoj kaj malamikoj esperantaj (ekzistas tiaj bedaŭrinde ankaŭ) mi aŭdis la diron, ke la menciita nova kolono en la Vortaro forprenas ĝian tutan valoron, ke ili pro tio ne povas rekomendi la libron al la lernantoj ktp.

Ĉu tia sinteno estas pravigita — ĉu la novaj formoj prezentas en si mem ion kontraŭfundamentan? — Ĉu la naskiĝo de la nova kolono en la „Oficiala Tabelo“ estas vivbezono pravigita aŭ ne?

Mi respondas, ke „jes“ — kaj jen la kialoj:

Mi lernis tuj ĉe la komenco de mia esperantistiĝo: Ĉio, kio en Esp. estas logika, klara, estas ĝusta, kvankam ĝi povas esti gramatike nekorekta (mi citas parkere — sed la senco estas la sama). Sed tio ne estas la ĉefa argumento.

Ni ĉiuj lernis: Ĉiu afikso, ĉiu gramatika finaĵo esperanta povas havi memstaram senco — kaj povas esti kunmetata kun ĉiuj aliaj radikoj. Esperanta praktiko proza, kaj des pli poeziaĵa — pravas tiun principon miloble.

Fine — ni ĉiuj legis: La lingvo internacia Esperanto devas nature disvolviĝi sur la bazoj de „Fundamento” — ne tuŝante ĝin, sed konstruante sur ĝi.

Ke Esperanto mirinde disvolviĝis sur tiu bazo, ke ĝi havas hodiaŭ ĝenerale alprenitajn vortformojn, nekonatajn al la aŭtoro de Esperanto mem, ni ĉiuj bone scias. Al tiu centmilo da novaj vortformoj apartenas ankaŭ la suprecititaj vortoj: aliu, aliam, aliel ktp. Ili estas rezulto de disvolviĝanta viva lingva bezono, kaj pro tio ili naskiĝis. Ne mi estas la unua, kiu ilin uzas. Depost 9 jaroj oni renkontas ilin en la laborista „SAT”-literaturo, uzas ilin konstante tia majstro de esperanta lingvo kiel S-ro E. Lanty, uzas ilin multaj aliaj — kaj — se temas pri mi persone — ili alvenis al mi ĉe la unua uzo de Esperanto tiel naturvoje, tiel memkompreneble kaj preskaŭ senkonscie, tiel logike, ke mi eĉ ne povas imagi, kiamaniere ili ne povus havi ekzistontan en internacia lingvo.

Kio en ili estas kontraŭ-fundamenta?

— „Ali” estas radiko de pola adjektivo „inny, a, e”. Kiel al ĉiu radiko, do ankaŭ al tiu-ĉi oni rajtas aldoni, se tio estas logike al-lasebla, la finaĵojn gramatikajn o, a, e, i. La plej ofta praktika finaĵo estas la adjektiva — a. Sed tre ofte mi vcllas esprimi ne la kvaliton, sed la objekton de „alieco”, kaj tiam nepre mi devas diri: „tio estas io alio” (ne alia) — aŭ: „faru tion alie”!; sed la logiko iras pluen — kaj ne nur la logiko — la tute natura kaj ĝusta analogio al la pola lingvo, en kiu ekzistas apartaj vortformoj por la ideoj adverbaj „aliam, aliel” ktp., postulas, ke tiuj formoj ekzistu ankaŭ en lingvo Esperanta. Kial tiurilate la lingvo internacia devus esti malpli riĉa ol la nacia? Do mi tradukas:

Kiedy indziej — aliam, gdzie indziej — alie, w inny sposób — aliel, kogo innego — alies, inna ilość — aliom (malofte uzata).

Ĉu tio estas herezo? Kial nur la radiko „ali” devus havi **esceptojn** kaj ne allasi al si la finaĵojn o, es, am, el ktp. — krom la sola „a”? Ne ekzistas do esceptoj en esperanta gramatiko, kaj tiuj, kiuj volus fari ilin rilate al la radiko „ali”, estis kontraŭfundamentuloj — ne ni, kiuj bazas sur „Fundamento” kaj volas vidi la lingvon taŭga por ĉiutagaj bezonoj.

Ekestas tie-ĉi alia demando — la **duobla senco** de la formo „alie” — sed pro ĝi ne plu ni kulpas — la „novuloj”, — se pri ia „kulpo” oni povus paroli. „Kulpas” la aŭtoro de Esperanto mem, kiu donis en la 7-a Regulo de Gramatiko la finaĵon -e al adverboj denomaj, kaj en la „Tabelo” la saman finaĵon al adverboj lokaj. Sed — ĉu ĝi estas „kulpo”? Al mi ŝajnas, ke ne, aŭ nur tre malgranda, ĉar la senco de la frazo preskaŭ neniam permesas al ni dubi, ĉu temas pri **eco** aŭ pri **loko** de agado. Sed por eviti eventualajn miskomprenojn, estus konsilinde fiksi praktike la uzon de tiu dusenca formo kaj interkonsenti ekzemple: Ni uzos la formon „alie” nur en **eca** senco, kaj por la loka senco ni uzos la kunmetaĵon „aliloke” — aŭ: ni uzos la formon „alie” en loka senco (gdzieindziej), kaj la ecan sencon ni esprimos per la moda formo „el” — aliel (inaczej, w inny sposób). Tiu afero estas preparolinda.

Estu la solvo de tiu problemo tia aŭ alia, ni fiksi la uzon de tiu vortformo tiel aŭ aliel, — restas ĉiam la vero, ke la nova kolono ne

estas kontraŭfundamenta — nek kun la radiko „ali“ en la mia, nek kun la finaĵo „en“ en la Tichawski'a libro.

Alia demando, ĉu de didaktika vidpunkto estas prave, ke ili troviĝu en la „Oficiala Tabelo“ — anstataŭ eble nur en piednoto aŭ tute aparte. Sed tio ja ne estas peko tiom granda, ke kelk-iuj — tro-timantaj ĉiujn novajn formojn, deklaru nur pro tio la tutan libron sen — ja eĉ malutila — kaj — preskaŭ bojkotu la eldonajon...

Personoj, volantaj ĉiam kaj ĉie esti „pli katolikaj al la papo mem“ — nenie bone impresas...

Jan Zawada.

S-ano Zawada verkis kun granda laboremece vortaron, kiu -- escepte la diskutatan „aliel“ — estas fakte kaj vere treege laŭdinda. Ĉu s-ano Zawada estas prava aŭ ne, batalante por la „nova kolono“ „aliel“, „aliom“ ktp.?

Kompreneble ne li estas la „kulpulo“. La novaĵo estas en Sat'aj rondoj tiel konata, ke s-ano Z. eĉ ne dubetas, ke „alie“ signifas — aliloke, aliel — alimaniere, aliom — alikvante ktp. Sed li forgesas, ke krom „Sat“ vivas almenaŭ „samom“(!) da „aliuloj“... Nome la t. n. burĝa esperantistaro, kiu estas almenaŭ same multa kaj „vivoza“ kiel la Sat'anaro... Kaj por ili „alie“ estas alimaniere kaj nenio alia ol „alimaniere“...

La vero, kiel ĉiam, troveblas en la mezo:

Pro la oftaj komparoj: „tia aŭ alia“, „tiel kaj alie“ k. s. kelkaj enuzigis diri: tiel kaj aliel, tiom kaj aliom, tiam kaj aliam ktp. Sed tio estis kaj estas **kontraŭfundamenta**, jes. Ĉar „alia“ estas tute malsama ol la tabelaj kvin vortetoj, kiuj kiel komunan literon havas „i“: k-i-u, t-i-o, ĉ-i-am ktp. Ĉu ankaŭ... al-i-e? Ne, ĉar „al“ ne estas tiu vort-antaŭparto, kiun la kolono sesa montras. Ĝi montras: „ali“! Sekve devus esti sole tiel: ali-i-u, ali-i-e, ali-i-el ktp. Komparu: kelk-i-u, kelk-i-om ktp. (Kial neniu inventis: kelkom, kelku ktp. Ĝuste pro tio kion mi ĵus montris).

Sekve nur: aliiu, aliiam, aliiom ktp. estas el esp. gramatika vidpunkto korektaj.

Koncerne „kien“, „tien“ ktp. ili estas tute regulaj.

Dr. Leopold Dreher.

GRAVA ALVOKO.

AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO.

KARAJ HELPEMAJ AMIKOJ,

1924 VIENA DEFICITO.

Al vi ni nin turnas kun la celo elkuraci por ĉiam la malsanon, kiu ĝenas kaj ĉagrenas ne nur la korpon sed ankaŭ la veran spiriton de la Esperanta movado.

Preskaŭ ĉiu samideano aŭdis pri la grava mondeficito, kiu rezultis el la Internacia Esperanta Kongreso okazinta en Vieno, 1924.

Multaj ridis pri tio; multaj mokis; ankoraŭ pli multaj kondamnis. Aliflanke, kelkaj sindonemuloj donacis al la malplena kaso; kaj, intertempe, malgranda grupo de Vienaj samideanoj akre suferis. Dume, la ĝenerala Esperantistaro daŭrigis sian feliĉan vojon tute nekonscia pri la kruelaj faktoj.

Nu, dum la Kongreso en Budapeŝt, ĉe speciala kunveno de la Ĝenerala Estraro de la Esperanta Movado, post alvoko de S-ro Stettler, Prezidanto de U. E. A. (kiu ĝisfunde esploris la tutan malgajan historion), oni elektis malgrandan komitaton, kies tasko estas fari lastan klopodon kolekti laŭeble sufiĉe da mono por pagi la deficiton. Ĝi konsistas el:

S-ro J. MERCHANT, Prezidanto de I. C. K.

S-ro ED. STETTLER, Prezidanto de U. E. A.

S-ro F. SCHOOF, Sekretario-Kasisto de K. R.

S-ro P. BLAISE, Honora Kasisto de B. E. A. kaj Komitatano de U. E. A.
(kiu estas nun komisiita kolekti la monon).

El la granda amaso de konfliktaĵoj, asertoj, kondamnoj, kaj senkulpiĝoj, eliras unue la certa fakto, ke tuj post la Viena Kongreso restis ŝuldo de sv. fr. 15,540 (proksimume £ 620), kiu, ĝis fino de Junio, 1928, grade malpliigis ĝis sv. fr. 9,388, t. e. £ 376.

Pri la kaŭzoj de la malsukceso financa de tiu kongreso neniam ekzistis plena interkonsento, sed oni rajtas diri, ke aldone al eblaj maltaŭgaj aranĝoj, eraroj, senzorgemo, k. t. p., estis nerifuteble, ke plejparte malhelpis la nesufiĉaj aliĝoj, nesufiĉaj kotizoj, kaj lastmomentaj revokoj; la malvaloriĝo de mono diverslanda, kaj la malfavoraj cirkonstancoj politikaj kaj ĝeneralaj.

Ĝis Feb., 1926, la Vienanoj ricevis donacojn de sv. fr. 1,620 (£ 65), el kiu 1,000 fr. (£ 40) venis de U. E. A., kiu volis per tiu ofero el sia kapitalo montri la vojon al samideanoj helpemaj. Plie, per vendoj, procesa malgrandigo de ŝuldoj, k. t. p., la deficito fariĝis sv. fr. 9,830 (£ 395). Sed, malgraŭ ĉiuj postaj alvokoj pri helpo dum la sekvantaj jaroj la ŝuldoj plie malgrandiĝis nur ĝis sv. fr. 9,388 (£ 376).

Tiam la kreditoroj, presisto kaj aliaj—kiuj, kompreneble, ne povis ĉiam atendi—decidis leĝe persekuti la restantajn membrojn de la Viena loka komitato. Oferante sian modestan havaĵon, deprenante el la salajro ĉion, kion ili ne bezonis por la ekzisto de la familio, tiuj malfeliĉuloj devis pagi tiom, kiom ili povis, tio estas sv. fr. 5,623 (£ 225); kaj tiamaniere malpliigis la ŝuldo ĝis sv. fr. 3,765 (£ 151) en Decembro, 1928.

En la nuna jaro la malgranda aro de Vienanoj (kiuj iam estis la plej senkulpaĵoj el la akuzitoj kaj tamen nun estas la sole ŝarĝitaj)—konsistas el KVAR modestaj Esperantistoj bonfame konataj kaj honestaj. Troe premitaj en la abismon de malfeliĉo kaj mizero, ili sendis korkrion al la Prezidanto de U. E. A., kiu promesis okupiĝi pri la afero nur se oni forlasus la diskuton pri jura kaj persona respondecoj; se oni ĉesus amasigi montojn da ciferoj, rezignus je la repago de ĝisnunaj personaj aferoj, kaj konsentus al provota kolekto je, ni diru, sv. fr. 5,000 (£ 200), por pagi la restantan deficiton kaj, se eble, iomete helpi al tiuj Vienanoj, kiuj dum la lastaj jaroj sin senigis de ĉio por pagi la diritan sumon de sv. fr. 5,623 (£ 225). (S-ro Stettler samtempe faris propran malavaran donacon).

Jen, karaj legantoj, kiel eble plej mallonge, la tuta malagraba afero.

Ĉu inde estas, ke nur kelkaj suferu pro ŝuldo, kiu tuŝas la honoron de la tuta Esperantistaro; ke ni parolu pri amo al la homaro ĝenerala, kaj ignoru la malfeliĉulojn en nia rondo mem: ke ni festu novajn kongresojn kaj forgesu la malĝojon de kelkaj malfeliĉaj organizintoj de la dekseka?

Ne, milfoje ne?

Memoru tion, kion faris la bonkoraj Esperantistoj dum la milito; memoru kion ili faris kiam alvokis la infanoj de la militintaj landoj, kaj en centoj da aliaj bezon-okazoj. Tiam decidu, ke vi tuj alprenos VIAN parton de la terura ŝarĝo, kiu nun tiel premeblas sur la ŝultrojn de niaj bonaj Vienaj amikoj. Kial ne tiamaniere solenigi la alproksimiĝantan Zamenhoftagon per malavara donaco?

Jen vi vidas la makulon. Ĝin ellavu!

Jen vi komprenas la neceson serĉi viajn monujojn. Ilin larĝe malfermu!

Jen vi konscias, ke fine la momento venas por montri ne nur al la mondo, sed al ni mem, ke Esperantismo ĉiam atentis la krion de la koro, kaj la gravan bezonon de iu malfeliĉa homo. Ĝin ne preterlasu!

Sv. fr. 5,000 (£ 200) unuavide ŝajnas esti sufiĉe grava sumo, sed se ĉiu individua Esperantisto konsciencie helpos laŭ sia modesta eblo, en unu jaro, eĉ en la daŭro de nur kelkaj monatoj, la tuta afero povos aranĝiĝi laŭ la kontento kaj feliĉo de ĉiuj koncernataj... t. e., de la tuta Esperantistaro.

Fidante kaj sindone,

MARGARET & PAUL BLAISE, (Honoraj Kasistoj).

La Redakcio de P. E. petas pri laŭebla subteno de la monokolekto por kovri la Vianan deficiton. Bonvolu alsendi monon al la Administracio de P. E. poŝtĉeke al konto Kraków n-ro 406.660. Sur la ĉeko indiku la celon por kiu Vi sendas. Ni enpresos listojn de mondonacintoj.

POLLANDA KRONIKO.

DANKO DE UEA AL POLA ĈEFDELEGITO.

La Prezidanto de UEA s-ro Ed. Stettler kaj la Direktoro s-ro Hans Jakob sendis leteron al s-ro J. Šapiro, Ĉefdelegito de UEA por Polujo, dankante lin „por celkonscia laborado, plenumita dum la nun finiĝinta administra jaro de la Asocio“. Elektiĝinte antaŭ iom pli ol 1 jaro, li sukcesis starigi nian Asocion je bona fundamento kaj kreskigi la nombron de ĝia membraro kaj Delegitoj.

La letero esprimas esperon, ke ankaŭ en la nova jaro s-ro Šapiro povos daŭrigi en la sama maniero kaj kunhelpi, ke UEA atingu la nombron de 10.000 anoj kaj Delegitoj en 2.000 lokoj.

BYDGOSZCZ. Fondiĝis „Esperanto-Grupo, Verda Stelo“.

CHELMNO. En ĉi-tieaj ĵurnaloj „Ziemia Chełmińska“ kaj „Nadwiślanin“ aperis propagandaj artikoloj pri Esperanto kaj sciigoj pri komencota kurso.

GRUDZIĄDZ. En la gazeto „Goniec Nadwiślański“ aperigis informajn artikolojn pri Esper. s-o W. Chmielewski.

KALISZ. „Eĉo Szkolne“, ĉiudusemajna revuo de popollerneja junularo aperigas ampleksan parton en Esperanto.

KRAKÓW. La 16-an de dec ĉi-tiea „Societo Esperanto“ aranĝis Zamenhofan festvesperon, kiun partoprenis ĉ. 50 pers. Enkondukan paroladon aŭdigis s-o prof. Bujwid, prez. de la grupo. Poste parolis s-o Dro Dreher kaj s-ino Dro Rosenthal, kiu ricevis multajn aplaŭdojn. Bele deklamis f-ino Rubinstein. Lerta dialogo de s-o Leibel kaj f-ino Anisfeld, celanta reliefigi signifon de la Festo de la libro, koncerto de esperantaj gramofondiskoj, vendado le libroj plenigis ceteron de la vespero.

LWÓW. Esperanto-Societo la 19 de dec. festis solene Zamenhofan datrevenon. Ĉeestis multaj gastoj. F-ino Nadel gvidas kurson, kiun partoprenas 30 gelnantoj.

NOWOGRÓDEK. La agema Delegito de UEA inĝ. Michał Chmieliński organizas nun kurson de Esp. por instruistoj de popolaj lernejoj, de li gvidotan.

WARSZAWA. Esperantista Rondo „Konkordo“ aranĝis la 15-an de dec. festvesperon sub prezidanteco de dro Leono Zamenhof. En la programo, krom malnovaj esperantistoj, partoprenis ankaŭ lernantoj de kurantaj kursoj, gajnante ĝeneralan aplaŭdon. Grava parto de la programo estis dediĉita al la Festo de la Libro. Loke funkciis bone provizita librovendejo, en kiu oni vendis librojn por 100 zł. En la pasinta jaro la Rondo aranĝis 3 publikajn prelegojn, bone frekventitajn. Ĝi ankaŭ klopodis por propagando en mezlernejoj, en kiuj okazis 18 prelegoj, kies rezulto estis starigo de libervolaj kursoj en tri knabinaj gimnazioj. Por plenkreskuloj okazis pasintjare 7 komencaj kursoj kaj tri kursoj por progresintoj.

WILNO. Nia malnova fervora samideano s-ro vicprokuroro Roman Sako-wicz persiste kaj sisteme propagandas Esperanton kaj varbas por UEA. Li ofte prelegas pri Esp. temoj en la Esp. Akademia Rondo. — Laste fondiĝis en Wilno Esperanta Societo „Universo“. Prezidanto estas Dro A. Gurwicz, vicprezid. Dro A. Goldburt, kasisto K. Geršater, Del. de UEA, sekretario — D. Fajnštejn, komitatanoj: B. Zalmanson, Dro A. Globusówna, A. Globus. Kunvenoj okazas ĉiumarde en la ejo Jagiellońska 3 lĝ. 2. Du kursoj sub gvidado de Dro Gurwicz kaj D. Fajnštejn komenciĝis.

ZAWIERCIE. Multipersonan kurson gvidas instruisto, s-o M. Sikorski.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Šapiro, Lipowa 33, Białystok.
Konto ĉe PKO No 60.047.

OFICIALA BULTENO No 14.

PREMIOJ POR FRUPAGINTOJ. Al ĉiuj membroj, pagintaj ĝis la 31-a de Decembro p. j. plene sian kotizon, estas sinsekve dissendataj premioj de frupago laŭ indiko de tiuj membroj. Al aliĝintoj, ne indikintaj la deziratan premion, ni sendis demandon. Ili bonvolu rapide respondi por baldaŭ povi ricevi la premion.

MALKARA ABONO DE „POLA ESPERANTISTO“. Kelkaj Membroj petis nin akcepti favoran abonpagon por „Pola Esperantisto“ (5 zł. anstataŭ 8 zł.). Ni ripetas, ke nur Membro-Abonantoj kaj Subtenantoj rajtas ĝui tiun favoron. Ni bedaŭrinde ne havas eblecon konsenti tiun grandan rabaton (3 zł.) ankaŭ al simplaj Membroj, kies kotizo egalas 6 zł. Membro-Abonantoj kaj Subtenantoj, dezirantaj

ĝui suprecititan favoron, bonvolu sendi la rabatitan abonmonon al la Ĉefdelegito aŭ transdoni al sia loka Delegito. **LA ADMINISTRISTREJO DE „POLA ESPERANTISTO“ NE AKCEPTAS REKTE DE LA MEMBRO-ABONANTOJ LA RABATITAJN ABONPAGOJN.**

RESPONDKUPONOJ DE UEA. Nova serio de respondkuponoj de UEA, validantaj ĝis 31-a de Decembro 1932, jam aperis. Ili estas oportune uzeblaj por afranko de respondo ĉe informpetoj, pago por libroj Esperantaj ktp. Ilia prezo estas pli maikara ol tiu de poŝtaj respondkuponoj kaj ili estas pli oportunaj pro sia longdaŭra valideco. Unu kajero, enhavanta diversajn kuponojn por entute 9 sv. fr., kostas 10 sv. fr. Membroj de UEA povas ricevi ĝin por 18 zl. (rekomendita afranko enkalkulita), pagante tiun sumon je poŝtĉekkonto No 60.047 en PKO Varsovio. Unuopaj kuponoj kostas sen afranko: 30-centima — 60 groŝojn, 50-ctm. — 95 gr. kaj 1 fr. — zl. 1,90. La respondkuponoj estas ankaŭ riceveblaj ĉe la Delegitoj.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Januaro 1930 UEA havis enregistritajn por la jaro 1930 143 membrojn (3 DM, 5 MS, 78 MA, 57 M) kaj 1 Esp. Entreprenon. Ĝoje ni konstatas multnombrajn novajn aliĝojn kaj ni esperas, ke ĉiuj ĝisnunaj membroj restos fidelaj al UEA. Per komunaj fortoj ni penu akiri en la jaro 1930 la nombron de 1.000 membroj por pruvi, ke Esperanto disvastiĝas, vivas kaj estas praktike uzata en Zamenhofa patrujo!

NOVAJ DELEGITOJ. Ni informas pri starigo de nova Vic-Delegito:

WILNO VD. Roman Sakowicz, juristo, Krzywa 23.

Ni petas ankaŭ noti la jenan adresŝanĝon:

STRYJ. D. S-ino Erna Zimand, komercistedzino, ul. 3 Maja 6.

La nuna stato de nia Delegita reto en Polujo estas: 79 Delegitoj kaj 23 Vic-delegitoj en 80 lokoj.

Membroj en lokoj, kie UEA ankoraŭ ne posedas Delegiton, estas petataj proponi sin aŭ alian taŭgan personon, respondantan al la laŭstatutaj kondiĉoj. Ĉiujn proponojn danke akceptas la Ĉefdelegito.

Białystok, la 1. 1. 1930.

J. Szapiro, Ĉefdelegito de UEA.

URGA LASTMOMENTA INFORMO!

Ĝoje ni informas, ke la Centra Oficejo de UEA konsentis speciale por Polujo plilongigi la tempolimon por ricevo de premioj por frupago ĝis la 31-a de **JANUARO 1930.**

Ĉiu rapidu do pagi sian kotizon al la Delegito en sia loko aŭ al la Ĉefdelegito por akiri belan libropremion. Indiku la deziratan premion ĉe pago de la kotizoj!

Białystok, la 7. 1. 1930.

DE LA REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO. OD REDAKCJI I ADMINISTRACJI.

Presante tabelon de la enhavo por la jarkolekto 1929 ni ne donas promesitan parton de la vortaraldono por ne malgrandigi kutiman tekston.

La Redakcio kaj la Administracio kore dankas ĉiujn, kiuj bonvolis alsendi Kristnaskajn kaj Novjarajn bondezirojn.

ATENTU! La Administracio sciigas pri ŝanĝo de la adreso, kiu de nun estos la sama kiel tiu de la Redakcio: Administracio de Pola Esperantisto, Kraków, Lubicz 34.

Pagu tuj la abonon por j. 1930 je nia konto PKO 406.660.

Abonu mem kaj varbu abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!



Harcerskie Kółko Esperanckie, urządzając w lutym tydzień propagandy esperanta, prosi gorąco o nadesłanie odpowiednich listów, pochodzących z korespondencji z zagranicą, w których znajdowałyby się opinie cudzoziemców o Polsce, pochlebne czy niepochlebne, ich wrażenia z pobytu itp. Listy oryginalne zostaną zwrócone, po wykorzystaniu ich przez wyświetlanie odpowiednich ustępów na ekranie. Prosimy podać nazwisko autora listu, kraj i zawód. — Adres przewodniczącej: M. Kazanowiczówna, Kraków, Lubomirskiego 43.

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakco: „Korespondado“.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

KORESPONDADO.

S-ro Václav Vitvar, instruisto en Konecchlumi apud Jičín interŝanĝas poŝtkartojn ilustritajn kun la poŝtmarko bildflanke kaj ankaŭ povas sendadi fotografajojn aŭ arte koloratajn poŝtkartojn el tuta ĉeĥoslovaka respubliko. Ĉiam tuj respondos al ĉiuj! Ankaŭ pri literaturo korespondadi kaj librojn interŝanĝi povas.

„Polskie Akademickie Tow. Esperantystów“, Warszawa, Bagatela 16. m. 3.
prowadzi

kurs korespondencyjny języka Esperanto. Opłata za cały kurs wynosi zł. 10.—

Wszelkich informacji udziela sekretarjat:

Warszawa, Leszno 99. m. 5.

Libreja Fakoj de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS:

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Baŭcki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio	1.30
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bcnnsels — Solandro	2.20
Bratescu-Voinesti — Niĉjo Mensogulo k. aliaj noveloj	0.65
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20
Glumarkoj „Babel“ 10 pecoj	0.10
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krioj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40

Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30.	
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928	5.00
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929	6.00
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Morgaŭ matene	2.60
— Norda vento; novelkolekto	1.30
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Korolenko — La sonĝo de Makaro	0.65
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912	0.80
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Lippmann — Sprachliche Gutachten	2.00
Malgranda terbiblio	2.00
Mérimée — Mateo Falcone k. aliaj rakontoj	0.65
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof	5.40
Przybyszewski — La neĝo	2.50
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Schmidt — La amkonkurantoj	0.85
Slowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Šapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Ŝlosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp.	7.50
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	2.00
Vigny — La intervidigo kaj nekonita dialogo	0.90
Wells — La dormanto vekigas	5.00
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10
Zawada — Plena podstatowy słownik j. Esp. (esp.-pol.)	4.00

La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parte po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baharaĥ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.

Drukarnia Ludwika Gronusia i Ski w Krakowie, Stolarska 6.





U R Ĝ A

lastmomenta sciigo !

Ni ĝoje informas, ke la Centra Oficejo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIŬO konsentis speciale por Polujo plilongigi la tempolimon por premioj de frupago ĜIS 31a DE JANUARO 1930.

Do, ĉiu membro, kies aliĝo atingos la Teritorian Oficejon de UEA en Bialystok plej malfrue la **31.1. 1930**, rajtas ricevi unu el la jenaj premioj laŭ sia elekto:

1. Hecter Hedler. Lia vivo kaj verko.
2. Dro Ad. Ferriere: Estonta eduko.
3. Raymond Schwartz: Verdkata Testamento.
4. Katolika preĝareto. — La origino de la religio (2 libretoj).
5. La Nova Testamento.
6. John Merchant: Tri Angloj alilande.
7. Novaj homoj kaj novaj vojoj. — Hebreaj progreso en Palestino (2 libretoj)

Profitu la **LASTAN OKAZON** por ricevi senpage **BELAN LIBROPREMION** kaj transdonu tuj ĉi-suban aliĝilon kun via kotizo al Delegito en via loko aŭ-se ne estas sendu ĝin direkte al

Ne forĵetu tiun—ĉi folieton!
Transdonu al alia!
Elpendigu en via Societo!

J. ŜAPIRO, ĈEFDELEGITO de UEA
BIAŁYSTOK, Lipowa 33.
Poŝtĉekkonto: P.K.O. Nr. 60.047.

ALIGILO 1930.

Mi aliĝas al Universala Esperanto-Asocio kiel
Membro, Membro-Abonanto, Subtenanto

kaj pagas la kotizon Zl. _____ kontante al la
Delegito—je P. K. O. Nr. 60.047.

Mi elektas premion de frupago No _____

Mi elektas premion de Subtenanto No _____

Mi pagas ankaŭ 5 zŝ. kiel favoran abonprezen
por Pola Esperantisto (nur per Membro-Abonantoj
kaj Subtenantoj)

Mia membro—Ne (por malnova membroj) estas _____

Nomo kaj antaŭnomo: _____

Adreso: _____

Dato: _____

Informojn pri premioj por Subtenantoj donas la Delegitoj.

Kotizoj por 1930: M- Zl: 6.—, MA - Zl. 15.—, S - Zl. 45.—